ANTAŬEN
suplemento de Informilo
3/25 Septembro 2017

La oka mirindaĵo de la mondo

Belegaj preĝejoj sekrete elĉizitaj sub la tero de la homo kun nekutima talento estas enmetitaj en montpiedo de Alpoj en norda Italio. Ili estas 50 kilometrojn de la malnovtempa (antikva) urbo Turin, kie situas la valo Valchiusella.


Síň Země: Nádherná prostora zbudovaná podle „nadpřirozené" vize svého tvůrce

La scenaroj de montaraj altaĵoj estas fakte ĉarmaj, ili estas prisemitaj per malnovaj vilaĝoj.

Sed profunde sub la tero, entombigita en praepoka roko, kaŝas sin la plej granda mirindaĵo de tiu ĉi regiono. Ĉi tie, 30 metrojn sub la supraĵo kaj kaŝita antaŭ la okuloj de la publiko, kuŝas belega sekreto, kiu povus esti komparata kun la antikva urbo Atlantis kaj kiun la itala registaro kromnomis „La oka mirindaĵo de la mondo".

Sur la onduma vojo sub la monto troviĝas naŭ katedraloj, kies dimensioj kaj riĉaj ornamaĵoj estas spirhaltiga. Ili estas konstruitaj kiel tridimensia libro desegninta la historion de la homaro. Ili estas kunligitaj per centoj da metroj de riĉe ornamitaj tuneloj kaj estas preskaŭ dekmil kvadrataj metroj grandaj. Nur por

komparo: turo Big Ben enhavas proksimume 500 kvadratajn metrojn.

Nur malmultaj homoj povis tien eniri kaj vidi tiun ĉi miraklon. Eĉ la itala registaro antaŭ kelkaj jaroj nenion sciis pri ĝia ekzisto.

Sed la katedralo Damanhur ne estas ia postlasaĵo de ia longe perdiĝinta civilizacio, ĝin ja verkis 57-jaraĝa asekura eksagento el norda Italio, kiu estis inspirita de vizio el sia infaneco kaj komencis fosi en la roko. Ĉio komenciĝis proksimume en la jaro 1960, kiam la knabo Obert Airaudim havis 10 jarojn.

Li asertas, ke de siaj fruaj jaroj li travivadis viziojn de tio kaj kredis, ke en sia pasinta vivo li vidis belegajn preĝejojn kaj katedralojn. En ilia ĉirkaŭaĵo vivis altnivela komunumo kaj bonfartis en idilia ekzisto, kie ĉiuj homoj laboris por komuna bono.

Por ke la vizio ŝajnu ankoraŭ pli bizara, Obert konstatis, ke li havas supernaturajn kapablojn – „donacon de malproksima vidado“ – kapablon vojaĝi per la okuloj de sia penso kaj detale priskribi la enhavon, de kiu ajn konstruaĵo. „Mia celo estis elkrei katedralojn el miaj vizioj,“ diras Obert, kiu pli volonte uzadis la nomon „Falco“, li komencis fosi provan ŝakton sub la domo de siaj gepatroj, ke li pli bone ekkomprenu la principojn de la fosado. Centoj da metroj de tuneloj ebligas perfektan cirkuladon de aero – lia ekkono estis spirhaltiga.

Sed nur kiam li komencis sukcese praktiki kaj havis karieron de asekura agento, li ekserĉis sian perfektan destinlokon. En la jaro 1977 li elektis solecan montpiedon, kie li sentis, ke la malmola roko kapablos elteni la strukturon, pri kiu li pensis.
Sur la montpiedo Falco konstruis domon kaj poste li translokiĝis tien kun kelkaj amikoj, kiuj samopiniis pri lia vizio. Ĉe uzado de martelo kaj pioĉo ili ekfosis en aŭgusto de 1978 en la klopodo elkrei la katedralon Damanhur, nomitan laŭ antikva subtera egipta katedralo, kies nomo signifas „Urbo de lumo“.
Ĉar ili ricevis neniun porkonstruan permeson, ili decidis dividi sian planon nur kun kelkaj same konvinkitaj homoj. La bonvoluloj, kiuj alveturadis el la tuta mondo, laboris en kvarhoraj skipoj dum la sekvantaj 16 jaroj, kvankam ili ne havis iajn aliajn formalajn planojn, ol skizojn kaj viziojn de Falco. Ili financis ĝin per la fondo de malgrandaj firmaoj, kiuj servis al la loka komunumo.



En la jaro 1991 estis jam pretaj kelkaj el naŭ kameroj kaj enhavis ĉarmajn surmurajn pentraĵojn, mozaikojn, statuojn, sekretajn pordojn kaj kolorajn vitrajn fenestrojn. Sed la tempo de sekreto malrapide forvantiĝis. La domo de la sekreto: Sub tiu ĉi domo troviĝas la katedralo Damanhur, kiu estas unu el la plej vastaj katedralaj kompleksoj en la mondo.
La unuan fojon, kiam la polico venis ĉi tien, ĝi estis surbaze de akuzo pro neagita imposto. Tiam la katedraloj restis netrovitaj. Sed pluan jaron la polico atakis la komunumon kaj postulis

montri la katedralojn, aŭ oni likvidos ĉion per dinamito. Do, Falco kaj liaj geamikoj malfermis sekretajn pordojn, por montri, kio estas post la pordo. Tri policanoj kaj publika akuzanto timeme eniris, ke ili vidu la unuan katedralon nomatan Salono de la Tero. Ili staris en plena mirego.
Interne troviĝas ronda kamero, kies diametro estas 8 metrojn. La plafonon el komplike ornamita vitro subtenis centre ĉizita kolono montranta tridimensiajn viron kaj virinon. La grupo plena de mirego paŝis pluen por konstati, ke la ĉizitaj kolonoj pli ol 8 metrojn altaj, estas kovritaj per orumitaj platetoj ĝis la plafono ..

„Kiam la policanoj rakontis ĉion al la oficistoj, ili decidis la katedralojn sekvestri en la nomo de registaro, ke ni povu daŭrigi la artistan laboron, sed ni estis devigitaj ĉesigi la pluan konstruadon, ĉar ni ankoraŭ ne havis porkonstruan permeson“. Tion diris Esperide Ananas, kiu verkis novan libron kun titolo Damanhur, — katedraloj de la homaro. Fine ili ricevis permeson kaj hodiaŭ la Damanhurianoj havas ankaŭ propran universitaton, lernejojn, vendejojn kun organikaj nutraĵoj, vitejojn, farmojn, bakaĵojn kaj ekologiajn domojn, kiuj ricevis premiojn.

Ili adoras nenian spiritan gvidanton, kvankam iliaj katedraloj iĝis lokoj de grupaj meditadoj. Ili estas ĉi tie por memorigi, ke ni ĉiuj kapablas agi multe pli ol ni pensas, ke kaŝitajn trezorojn ni ĉiuj povas trovi, kiam ni konstatos, kie ilin ricevi – diras Falco.

El OSUD.cz 2007 byLubos Esperantigis Jarmila Rýznarová